

## Nova rubriko serĉas aŭtorojn

Se vi volas informi pri la rilatoj inter scienco kaj Esperanto, verku por tiu ĉi rubriko en Scienca Revuo

JOHANNES MUELLER

---

La Scienca Revuo strebas esti vasta revuo pri sciencoj esperantlingva. Sed ne nur aperos en ĝi sciencaj artikoloj en Esperanto – tamen la sciencaj artikoloj estas la plej grava enhavrubriko. Alia rubriko estas tiu ĉi, kiu celas prilumi la rilatojn inter scienco kaj Esperanto. Ĉar ankoraŭ ne estas sciite, ke nun ekzistas tiu ĉi rubriko en la Scienca Revuo, sekvos nun eta artikolo, por klarigi, kio en tiu rubriko aperu.

---

## 1 Celo de la rubriko

Esperanto ekde sia komenco estis alloga por kleraj homoj. Se oni traserĉas la unuan gazeton esperantlingvan *La Esperantisto* oni trovas multajn klerajn artikolojn pri multaj diversaj temoj. En tiu ĉi eldono de Scienca Revuo MÉLANIE MARADAN donas superriĝardon pri la historio de scienca agado en Esperantujo kun fokuso al la Scienca Revuo kaj ĝiaj praformoj antaŭ la dua mondmilito.

Sed tio ja ne estas ĉio dirinda pri scienco kaj Esperanto. Ekzistis kaj ekzistas aliaj ekzemploj pri scienca agado en Esperantujo. Informi pri tiuj estas celo de tiu ĉi rubriko de Scienca Revuo. Homoj, kiuj volas fake apliki Esperanton, laŭeble sciu pri plejparto de la scienca agado en Esperantujo. Tial la scienca revuo ne nur kovru la sciencojn mem, sed ankaŭ aliajn sciencajn agadojn en Esperantujo.

## 2 Ekzemploj

### 2.1 Sciencaj aŭ fakaj projektoj en Esperantujo

Kvankam la Esperanto movado estas relative malgranda, estas mirinde kiom multaj kaj kiaj diversaj aktivaĵoj okazas en ĝi. Ekzistas multaj fakaj projektoj, kelkaj viglaj, kelkaj neviglaj, kelkaj eĉ kvazaŭ mortaj.

Multaj el ili povus esti pli sukcesaj, se pli da homoj scius pri ili. Foje okazas, ke iu lanĉas interesan projekton nesciante, ke simila projekto jam ekzistas aŭ ekzistis kaj mortis pro manko da homforto. Se vi konas tiajn projektojn ekzistantajn aŭ mortintajn, sukcesajn aŭ malsukcesajn kaj ankaŭ estontajn, informu pri ili en tiu ĉi rubriko. Tio utilas kaj por tiuj projektoj mem, ĉar eble homoj pri ili ekinteresiĝos kaj partoprenos.

Kaj ĝi utilas por homoj, kiuj post multaj jaroj volas esplori la historion de la scienca agado en Esperantujo. Ili trovu en la *Sciencia Revuo* ampleksan kolekton de materialo.

## 2.2 Sciencaj verkoj en Esperanto

*Elementa fotografa optiko* – tio estas titolo de libreto kiun mi antaŭ kelkaj jaroj trovis en libroservo. La aŭtoro de tiu verketo nomiĝis KARLO VERKS kaj la verko eldoniĝis kiel parto de *Internacia Scienca Kolekto* en la jaro 1906. Ege interesa verketo pri optiko, bedaŭrinde preskaŭ nekonata. Kaj ĉar ĝi estas parto de kolekto devas ekzisti pli da tiaj verketoj. Tiuj ne perdiĝu en bibliotekoj sed estu uzataj kiel parto de bazo por la scienca kaj faka agado en Esperanto.

Grava paŝo por konservi tiajn verkojn estas sciigi homojn, ke ili ekzistas. Do se vi posedas tian verkon, ne simple konservu ĝin en via bretaro, sed verku pri ĝi recenzon por tiu ĉi rubriko.

## 2.3 Esperantistaj sciencistoj

Esperantistoj ofte fanfaronas, kiom multaj nobelpremiitoj estis aŭ estas Esperantistoj. Tamen oni ofte havas la impresojn, ke multaj el tiaj fanfaronuloj ne scias kiuj estas tiuj nobelpremiitoj kaj eĉ malpli pri ties sciencaj sukcesoj. Do se vi bone konas aŭ volas memori pri sukcesa meritinta sciencisto, kiu ankaŭ estis sukcesa kaj konata Esperantisto, verku etan biografion por tiu ĉi rubriko.

## 3 Konkludo

Multaj interesaj fakaj agadoj kaj projektoj okazas kaj okazis en Esperantujo. Multaj interesaj kaj utilaj verkoj aperis kaj aperas. Sukcesaj tiuj projektoj nur estas, se homoj pri ili scias aŭ memoras. Do denove la alvoko: Sciigu kaj memoru pri *Scienco kaj Esperanto* en tiu ĉi rubriko en la *Sciencia Revuo*.